

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATIA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO

*U.L.L.L. (Via Lelio La Belmonte)  
Rue Esperantiste Grp  
Fio \* Breughel \*  
Journaleen 27 Brussel*

Officieel Orgaan  
van den

Vlaamschen  
Esperantisten -  
Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

## EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque	Fr. 55,—	bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Si — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallieter — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
Literatura Mondo (ĵarabono), 6 n-g.	54,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz	18,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten)	10,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
La Verbo en Esperanto	10,50	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,—	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

<p><b>Cefredaktoro:</b> A. Pittoors Ten Eeckhovelei, 125 Deurne-Noord Antwerpen</p>		<p><b>Administranto:</b> Adolf De Keyzer P. van Humbeekstr., 3 Brussel (West)</p>
---	--	---

**Jara abonprezo:** 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj  
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj  
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

## ONZE ORGANISATIE

Nimmer was bij ons volk de drang naar cultureele verheffing zoo sterk als nu. Inderdaad zien we een aantal verdienstelijke verenigingen bloeien die, elk op eigen gebied, de Vlamingen in hun cultureele betrachtingen vooruithelpen.

In de rij der Vlaamschecultuurverenigingen bekleedt de Vlaamsche Esperantisten Bond een speciale plaats en heeft dan ook een eigene taak te vervullen. In ruimeren kring nog te weinig gekend, wordt vaak het doel onzer vereeniging verkeerd uitgelegd. Zelfs onder onze leden treft men personen aan, die blijkbaar niet volledig op de hoogte onzer betrachtingen zijn. Op gevaar af van in herhaling te vervallen, zullen we hier bondig ons doel en streven toelichten.

De Vlaamsche Esperantisten Bond streeft naar de verspreiding der internationale taal in het Vlaamsche land en ijvert voor de officieele erkenning en toepassing van Esperanto, gebruikt de wereldtaal om de Vlaamsche cultuur in het buitenland bekend te maken, betracht wereldvrede.

De opzet is grootsch en ons streven verdient dan ook den steun van ieder vooruitstrevend Vlaming. Weinigen weten, dat dank zij de uitgave in het Esperanto van werken van Conscience, Timmermans, Bakelmans e.a., de Vlaamsche ziel vermocht door te dringen in gebieden die anders voor haar ontoegankelijk waren gebleven. Dat Vlaamsche werken als « de Leeuw van Vlaanderen » en « Palieter » nu gelezen worden in IJsland en Lithauen en te koop zijn in Shanghai en Tokio, stemt toch tot nadenken.

Deze Winter organiseerden wij in c. 30 plaatsen cursussen die honderden deelnemers telden. Wij mogen niet verpoozen, maar moeten deze nieuwe Esperantisten voor onze organisatie winnen! Om degelijk werk te verrichten is een sterke organisatie een noodzakelijkheid. Daarom ook is het een vereischte dat alle Esperantisten in Vlaanderen onze rangen vervoegen.

Mocht het werk onzer betrekkelijk jonge organisatie gedijen en ons streven in Vlaanderen talrijke aanhangers vinden!

E. C.

# Esperanto in de Praktijk.

## BRAZILIE

Het officieel gidsboek der 9-de internationale handelsbeurs van Rio-de-Janeiro verstrekt inlichtingen en behelst het algemeen reglement in het Esperanto.

## DUITSCHLAND

In Juli 1936 werd in Duitschland een bevel uitgevaardigd waarbij al de Esperanto-vereeningen werden ontbonden. Blevten nochtans toegelaten : het gebruik der internationale taal en het dragen van het Esperanto-teeken. Nu wordt gedeeltelijk op vernoemd bevel teruggekomen, de handelsinstelling « Komerca Esperanto-Unio » te Dresden verkreeg nl. de toelating hare werking te hervatten.

## FINLAND

Door de Finsche vereeniging voor vreemdelingenverkeer werden in de 32 belangrijkste spoorwegstations adresplaten aangebracht der plaatselijke afgevaardigden van het internationaal Esperantto-verbond. Deze afgevaardigden staan belangloos ten dienste der Esperanto-sprekende toeristen uit het buitenland.

## FRANKRIJK

Te Boulogne-aan-zee werden borden met douane-aanduidingen in In het Fransch en Esperanto aangebracht.

## OOSTENRIJK

Het stadsbestuur van Weenen zond aan al de vakscholen der hoofdstad een schrijven, waarin de leerlingen worden aangezet de Esperanto-cursussen door het Oostenrijksche Esperanto Verbond ingericht, te volgen. De vakscholen van Weenen worden door c. 18.000 leerlingen bezocht.

De spoorbedienden die de internationale taal machtig zijn, dragen tijdens de diensturen, een kenteeken met het woord «Esperanto».

## SPANJE

Viermaal in de week worden van Barcelona mededeelingen over de Spaansche krijgverrichtingen in het Esperanto uitgezonden. In het Esperanto verschijnen twee tijdschriften die het standpunt der regeering betreffende den Spaanschen burgeroorlog verdedigen. Commandant Dangada Rosenörn, voorzitter der Spaansche Esperanto-Federatie, werd tot generaal benoemd.

## TSJECHO-SLOWAKIJE

Over de druipsteengrotten van Domica, Jašov en Bielskà verscheen een mooi folder. Tal van foto's geven ons een kijkje in deze onderaardsche wonderwereld, waarvan de Esperanto-tekts een verklaring geeft. Gratis verkrijgbaar bij « Klubo de Ĉeĥoslovakaj Turistoj » en Strbské Pleso, Ĉeĥoslovakio.

## ZWITSERLAND

De Zwitsersche vereeniging voor toerisme liet een rijk geïllustreerde brochure verschijnen in kleurendruk. Deze uitgave bevat nuttige inlichtingen over wintersport en wordt aan belangstellenden gratis toegezonden. Te bevragen bij « Svisa Turisma « Bahnhofplatz 9, Zürich.

# 8a Flandra Kongreso de Esperanto de la 15a Ĝis la 17a de Majo

## DUA KOMUNIKO



Jenaj ŝanĝoj estas farendaj al la provizora programo :

1. La akceptejo ne funkcios en la Flandra Domo, sed en la STACIDOMO, restoracio de 2a klaso. Ĝi malfermiĝos je la 14a. La aliaj okazantaĵoj de Sabato la 15an okazos en Flandra Domo kiel indikita.
2. Ankaŭ Dimanĉo okazos sekvantara iro kun flagoj kaj streĉtuko de la fotografadloko al la Urbodomo kaj de tie al «Lovanium».
3. Erare estis indikata, kiel prezo en luksa hotelo 40 kaj 25 fr., devas esti : 40 kaj 35 fr.
4. La prezo de la festeno estas 16 fr. anstataŭ 20 fr. Ankaŭ la nova prezo entenas trinkmonon, sed ne trinkojon.

La O. K. insiste petas grupojn aŭ personojn kiuj havas fasadflagon aŭ streĉtukon, bonvoli sciigi ĝin al ni kaj sendi ilin ĝustatempe.

KOTIZO : 12 fr. por liganoj, 15 fr. por Gastoj.  
*Korespondantojn* oni bonvolu direkti al la sekretario de la O. K. : Lode CNOPS, Broekstraat, 21, HEVERLEE.

MONSENDOJN oni faru sur P. Ĉ. 196.161 je nomo, de S-ro DE KESEL, Bondgenootenlaan, 177, LEUVEN.  
GLUMARKOJ trikoloraj haveblaj po 6 fr. la 100.

PRIPENSU TUJ LA LOGADON SE VI VOLAS KOMFORTE LOGI !

## Kunveno de Flandra Ligo Esperantista

Ligkunveno okazos dimanĉon la 14-an de Marto, je la 10-a mafene, en la ejo « Breughel », 37, Em. Jacquainlaan, Brussel.

Tagordo :

1. Raporto de la sekretario pri la antaŭa kunveno.
2. Akcepto de novaj sekcioj kaj reprezentantoj.
3. Enoficigo de la nova redaktoro.
4. Nia 8-a kongreso en Leuven.
5. Nia agado dum la vintra sezono.
6. Ekzamena komisiono.
7. Situacio de la ligo.
8. Diversaĵoj.

Ni atentigas la sekciojn, ke ili havas la nepran devon sin reprezentigi per unu oficiala delegito, niaj lokaj reprezentantoj estas bonvenaj.

LA ESTRARO.

# Leuven-Universitato-Studentoj

TRIO NEDISIGEBLA

Aŭdante la vorton « Universitato », ni kun miro kaj respekto pripensas la grandan noblan rolon, kiun tiu instituto ludis kaj ludas en la nacia, en la homara vivo... Sed kiam ni aŭdas la vorton « Studento », ni same facile pensas pri la plej granda kontrasto kun io tiel serioza kiel Universitato... Kaj tamen estas tiuj studentoj, kiuj kelkajn jarojn joste, ofte ludos imponan, ĉefan, certe seriozan rolon en la vivo.

Kiam ni aŭdas la nomon « Leuven », ni tamen pensas samtempe pri tiu serioza Universitato kaj pri tiu malserioza studento. Ĉar, en nia jarcento, kiel jam deŝt pli ol kvin jarcentoj, la vorto « Leuven » preskaŭ ĉiam estas akompanata de la vorto « Universitato ».

Kiel ni jam menciis en la historia skizo pri nia Dejlo-urbo, la Universitato de Leuven estis fondita en la jaro 1425, laŭ dekreto de Papo Martino V, sub instigo de la duko de Brabanto Jan IV. Sajnas ke tiu duko, tute ne estis tre serioza, sed sub influo de siaj konsilantoj, li klopodis rebonigi sian reputacion, per tiu fondo.

La Universitato de Leuven estis la unua en la Nederlandoj.

La malfermo okazis la 8-an de Oktobro 1426, kaj la unua rektoro estis Willem Neefs.

Simpla estis tiu komenco, sed tuj la nombro de profesoroj kaj studentoj kreskis kaj post la unua politika unuiĝo de la Nederlandoj sub la burgondia regado, ĝi iĝis vera centro de intelekta vivo.

Tiam ekbrulis la longdaŭra kaj vigla batalado inter Renesanco kaj Reformacio. Estis en tiu tempo ke Desiderio Erasmo aperis en Leuven, li, kiu kvazaŭ kunigis en si la du tendencojn, li, kiu defendis reformojn religiajn, kiujetendiĝis ĝis la ekstrema limo, kiun la katolika obeemo al li permesis.

Estis, inter alie, sub lia impulso ke la Universitato akceptis la principojn de l'humanismo, kaj ke estis fondita en 1517 la « Collegium trilingue » (Kolegio trilingva) por la studado de la Hebrea, Greka, kaj Latina lingvoj. La ĉefaj kunlaborantoj de Erasmo estis : « Barlandus, Clenardus, Despanterius, Dorpius, Joano de Palade kaj Juan Luis Vives.

Estis ankaŭ Erasmo, kiu asertis pri la prosperigo de tiu Universitato en la XVI-a j. c. « Ĝi estas, li skribis, nura juvelo en tiu parto de l'regnolando de l'Imperiestro Karolo, nenie oni pli facile kaj trankvile povas studi, nenie troviĝis plej granda nombro da profesoroj, kiuj majstras sian taskon ». Ĝi estis egala al tiu de Parizo, escepte koncerne la studentnombro, kiu tamen atingis 3000.

En 1512 tamen, Erasmo devis forlasi Leuven. Li, mezopunkto inter la du sin interbatalantaj tendencoj, riskis ricevi la frapojn de la du flankoj.

En tiu tragedia tempo de l' religiaj militoj, la lovena Universitato restis fidela al la Hispana reĝo Filipo II, tamen sen aprobi la

LITERATURA MONDO  
nia sola literatura gazeto.  
Kunlaboras ĉiuj gravaj  
E-verkistoj. Abono por  
jaro fr. 65; specimeno fr. 2.  
La plej detalajn kaj objek-  
tivajn librokritikojn vi  
trovas en  
LINGVO - LIBRO  
kvaronjara aldono al Lit.  
Mondo.

Abonojn akceptas kaj spe-  
cimenojn sendas :

**Flandra Esperanto-Instituto**

Magdalenast., 29, Kortrijk (P.K. 326851)



*do Mo-libro - mia nomo  
Min puskultu jin homo:-  
Skrvos tie ĉi, monate,  
Novaj versoj, akurate.  
Se vi ĉiujn skribos mane,  
Vi ja ne klapos dos pane!  
Ni vin por la granda laco  
Rekomencos per donaco.*

tiranajn metodojn de l' duko de Alva ; kaj estis post konfidenca letero de la Teologia fakultato ke la imperiestro retiris la senkompatan buĉiston.

Dum tiu tempo la akademioj konis dekandecan periodon. Multaj studentoj forlasis la urbon kaj la plej granda nombro de kolegioj fermiĝis.

La plej granda figuro el tiu periodo estis *Justo Lipsio*. Li naskiĝis en Overyssehe la 18-an de Oktobro 1547. Li studadis i. a. en Köln, en Leuven, iris al Romo, kie li estis latina sekretario de kardinalo Granvelle, revenis en 1569 en Leuven, tuj revojaĝis tamen al Vieno, iĝis profesoro de historio ĉe la Universitato de Leiden.

Denove en Leuven li iĝis historia verkisto de l'preĝo de Hispanujo. Liaj diversaj oficoj sufiĉe almontras kiam li transiris de la katolika al la protestanta religio kaj fine revenis al la katolika...

En tiu sama jarcento ni ne povas forgesi kelkajn aliajn famajn scienculojn.

En la medicina fakultato : *Andreas Vesalius* (1514-1564), kiu estas la patro de la moderna anatomio. Li akiris de la urbo la rajton havigi la kadavrojn de la krimuloj mortigitaj, ĉar antaŭe la medicino nur estis bazita sur vegetajaj kaj mineralaj produktoj.

Kun li ni ankaŭ nomas *Remberto Dodoens*, *Jan Van den Heetvelde*, *Jan van der Weyden*, *Jeremias Bryvere*.

En la arta fakultato ni tiras la atenton al la konata *Merkator*, kiel geografia scienculo. Sed la nomoj de *Vermlaers* kaj *Valerus Andreas* ankaŭ restos konataj, ĉar ili estis la verkistoj de la historio de la Universitato mem.

Nova floranta periodo venis de post 1617, sub la regado de la ĉef-gedukoj *Alberto* kaj *Isabelo*, kiuj reorganizis kaj plikunigis la instituton. De post tiam estis devigata havi oficialan titolon de la Universitatoj de Leuven aŭ de Douai por iĝi magistrato, advokato aŭ kuracisto.

Novaj malfacilaĵoj sin prezentis sub la regno de l' aŭstria reĝo Jozefo II, kiu intencis aliformigi ĉiuspeciajn intimajn vivmanierojn de nia lando, precipe sub religia vidpunkto. La Universitato sin defendis. Sed la imperiestro transloĝigis la universitatan sidejon al Brussel.

Estas do tre komprenebla ke fine oni ĝojis, kiam la Brabantaj patriotoj forpelis la Aŭstrojn, kaj proklamis la sendependecon de la Sud-Nederlanda ŝtato.

Ankoraŭ pli terura tamen estis la vivo post la Franca invado. Ili postulis grandegajn monsumojn kaj forprenis 5000 librojn ; kaj en Oktobro 1797 la Universitato estis fermata. Ĝiaj bienoj fariĝis proprajojn de la respubliko, kiu uzis aŭ vendis ilin. El la libroj de la biblioteko formiĝis la biblioteko de la centra departementa lernejo, poste apartenis al la urbo de Leuven, kiu uzpruntis la librojn denove al la Universitato en 1835.

Dum la periodo de la Unuigitaj Nederlandoj (1815-1830) Leuven havis ŝtatan Universitaton. Kaj en 1834 la episkopoj fondis en Mechelen novan katolikan Universitaton, kiu en 1835 transloĝigis al Loveno. La unua rektoro estis lia pastra moŝto De Ram.

En 1914 terura brulado detruis la bibliotekon kun ĝia riĉa, valora enhavo. Ankaŭ la dokumento de la Fondo de antaŭ 500 jaroj estis detruita. Post la milito, nova, bela biblioteko estis konstruita. Leuven leviĝis el sia cindro kaj kun la triumfa reviviĝo, ankaŭ reviviĝas la Universitato, la universitata vivo.

Nun ekzistas 6 fakultatoj : teologio, kanonika rajto, civila rajto, medicino, filozofio kaj literaturo, scienco. En la du unuaj la lingvo restas latina, sed en la aliaj nun estas Nederlanda kaj Franca sekcio.

\* \* \*

Universitato-Studento-Loveno... ni skribis komencante...

Kio estas Leuven sen la Universitato?

Kio estas Leuven sen la studentoj?...

Ambaŭ donas specialan karakteron al tiu flandra urbo, kiu pli ol Brussel kaj Gent, subigas tiun influon, ĉar ĝi estas malpli granda kaj la nombro de studentoj pli imponaj.

Antaŭe, Universitato estis kvazaŭ urbo en la urbo, tute sendependa kun specialaj juĝistaro, ordonoj, kutimoj, rajtoj, privilegioj.

Tiam kaj ankaŭ ofte nun, bruado kaj gajeco estas la kvalitoj de sinjoroj la studentoj. Kaj en la tempo ke ĉiu gildano havis armilojn, ankaŭ la studentoj estis armataj. Kaj ne ĉiam tiuj armiloj servis nur por defendi la urbon kontraŭ eksteraj malamikoj. Okazis eĉ ke ili havis la fantazion invadi unu aŭ alian trinkejon, kaj perarme tie regis laŭvole dum tuta vespero...

Aŭskultu tiun mezepokan kanton, (laŭ tre libera traduko !), kiu skizas la fizionomion de tiuspeca studento, kui, feliĉe, ne estas la bildo de la plimulto. Sed kutime estas ĝuste la eksterordinaraj, ankaŭ en la malbona senco, kiuj estas rimarkitaj, ĉu ne ?



Laŭ la vestaj' regulo  
Estis unu altklerulo  
Kiu ŝajnas sciencist'  
Ĉar en universitato  
De Loven' aŭ de pirato,  
Ili restis kun persist'...

Unu kiu batalante,  
Tempon uzas, aŭ klaĉante;  
Kiu ŝatas dolĉan vinon,  
Amindumas la virinon,  
Trinkas, ludas sen mezur'

En la modernaj tempoj, la vivo de l' studentoj pli kaj pli enmiksas sin en la ordinara burĝa vivagado, kaj tio estas pli bona por ambaŭ homgrupoj.

Ni tamen ne estas pesimistoj, Gojo kaj gajeco certe estas flandraj kvalitoj. Bieron kaj dancon ne malŝatas la flandra filozofa, ĉu li sin nomas Pallieter aŭ Uilenspiegel, ĉu li estas studento aŭ ne, ĉu li loĝas en la urbo de la bovinpafantoj, de la sinjoroj, de la kokinmanĝantoj, de ŝnurportantoj, de la ŝafkapoj aŭ de la lunestingantoj.

Ni ĉiuj tutkore kunkantas kun la vivoplena poeto Rene De Clercq, kaj la muzikisto Emiel Hullebroeck kiam la « gildo festas... » kaj kiam la flandraj esperantistoj... kongresas.

« Li de biero ne ŝatant'  
de rava kanto ne ĝuant'  
de belknabino ne kisant'  
Vivu glas' ! Vivu kor' ! Vivo Kant' !... »

Pol VAN DER POEL.

## Het ei van Columbus

Af en toe treffen wij in de dagbladen het nieuwsje dat een of ander taalliefhebber een nieuwe internationale taal heeft samengesteld... En de ongewijden, wanneer zij hooren over Ido, Novial, Nov-Esperanto, Occidental, gemoderniseerd Latijn, en wat weet ik al, en gij spreekt hen over Esperanto, dan zetten ze zonder meer dit laatste op denzelfden rang.

Al die systemen zijn misschien niet slecht, maar in ieder geval ook niet beter dan Esperanto. Maar er is dit verschil. De andere systemen blijven, hoogstens door enkele menschen gekend, dikwijls veroordeeld om in de schrijftafel van den schrijver een roemloozen dood te sterven. Maar Esperanto leeft...

Die nieuwe ontdekkers der wereldtaal, die de daad van Dr Zamenhof pogen te kleineeren, mag men de anecdote van het Ei van Columbus voor de voeten werpen... Als eenmaal Amerika ontdekt was, ho, dan hadden zij dat zoo wel gekund.

Al die zoo-gezegde nieuwe talen, met uitzondering misschien van het gemoderniseerd Latijn, zijn eenvoudig naäperijen, dikwijls zelfs slechts een afleiding van het Esperanto. De een of de andere vond dat er zus of zoo aan ontbrak, hij zou het eens gaan verbeteren, en als iedereen maar niet dadelijk de groote verdienste er van inzag, dan maar schisma veroorzaken en juist de gedachte, die men beweerd te dienen den genadeslag toebrengen, of de buitenstaanders in hun onwetende onverschilligheid tegenover Esperanto aanmoedigen.

Maar Esperanto leeft, zegden wij hooger.

En ik wil hier de getuigenis aanhalen, die reeds dateert van voor den wereldoorlog, namelijk deze van Dr Mayer, professor in de latijnsche letterkunde aan de universiteit van Cambridge, die in 1907 aldaar deelnam aan het internationaal kongres van Esperanto, dat 1700 volgelingen van Dr Zamenhof, uit alle werelddeelen daar te zamen bracht.

Professor Mayer was toen ongeveer 90 jaar oud, had pas zelf Esperanto geleerd en ziehier zijn geestdriftige getuigenis :

« Hoewel aan den rand van het graf, heb ik nog Esperanto willen leeren, en het is in die taal, dat ik Dr Zamenhof kom hulde brengen en hem mijn diepe erkentenis betuigen voor het wonder, dat hij verricht heeft en waarvan ik getuige ben geweest.

» Ik heb het mirakel van Pinksterdag zien vernieuwen, wanneer de gave der talen aan de nederigen werd geschonken ; ik heb mij vervoerd gevoeld naar een nieuwe wereld van eendracht en broederliefde, en waarvan gij, Zamenhof, de Columbus zijt geweest...

» Ik durf aan de geheele wereld het Esperanto aanbieden, omdat het aan alle eischen eener wederlandsche hulptaal voldoet ; het is eenvoudig, welluidend en zijn woordenschat laat toe alle gedachten met de grootste stiptheid uit te drukken. »

Dit was in 1907, toen praktisch gesproken Esperanto nog in de kinderschoenen liep, toen het eerste zaad slechts alom werd uitgestrooid, en evenals thans de kleingeestige argumenten tegen Esperanto werden uitgespeeld, die maar steeds door nieuwe onwetenden herhaald worden, alhoewel ze door bevoegde personen, door professoren met naam werden weerlegd.

Maar Esperanto is de kinderschoenen ontgroeid.

Op dit oogenblik mag beweerd, dat het zich aangepast heeft, zelfs aan ingewikkelde technische of beroepstermen, zoodat zijn uitdrukingskracht die der nationale talen evenaart, zooniet overtreft.

Wanneer wij gewagen van de kunstmatige taal Esperanto, dan zouden we eigenlijk moeten uitroepen : Neen, Esperanto, alhoewel op kunstmatige wijze aan een grondslag gekomen, is zoo levend, zoo plooibaar, zoo rijk geworden uit de ontwikkeling, den groei, de aanpassing van zijn woordenschat, dat het inderdaad de levendigheid, de soepelheid, de bekoorlijkheid eener nationale taal heeft bereikt.

Het beste bewijs daarvan : Esperanto, dat nochtans in de eerste plaats als hulptaal, dus als vertalingstaal is aangewezen en op die wijze schitterend zijn groote waarde heeft bewezen, en nog dag aan dag bewijst, heeft bijaldien een internationale oorspronkelijke literatuur doen ontstaan, waarin de dichtkunst, hoe paradoksaal het ook klinke, een heerlijke hoogte heeft bereikt.

Wij vernoemen hier den naam van Dr Kolomano Kalocsay, docent aan de universiteit van Budapest, die reeds 25 jaar in de Esperantobeweging staat. Heel wat organisatie- en ander werk heeft hij op zijn actief, maar het vermelden waard is wel, dat hij een bloemlezing uitgaf met uit de oorspronkelijke talen overgezette gedichten uit 22 verschillende talen.

Maar van hem dient vooral aangestipt, dat hij de oorspronkelijke Esperanto-gedichten op dezelfde hoogte heeft weten te plaatsen als die der hoogstaande nationale letterkonden. Reeds verscheidene dichtbundels zagen het licht. Hij is als de baken van de Esperantische dichtersschool. Onverpoosd doorvorschte hij de mogelijkheden die het Esperanto bieden kan, met ongevenaarden moed brak hij met slenter en conservatisme, en wierp het keurslijf weg dat de ontplooiing eener natuurlijke dichtkunst omknelde; hij schreef hoogstaande, diepdoordachte werken over dit zelfde onderwerp, en wist de lijn aan te duiden, die zooals wij hooger vermeldden, Esperanto nevens de nationale talen plaatste.

Wij herhalen, alhoewel dit niet het hoofddoel van Esperanto is, die literaire opbloei, dit gestadig literaire leven, is zooals voor de nationale talen, de kracht, die steeds nieuwe energie ontwikkelt, want voor Esperanto is waar, wat voor iedere taal waar is, zonder letterkunde zou het kwijnen. Maar de Esperanto-literatuur leeft.

Esperanto leeft...

Esperanto is ontdekt... Het wonder van Pinksteren kan zich universeel hernieuwen met den goeden wil, met den oprechten vredeswil der menschen, die mekaar door Esperanto leeren kennen, begripen en liefhebben. Geen kunstmatige opgezette reizen van het eene naar het andere land, waar de twee soorten volksgenooten als posturen tusschen mekaar kunnen wandelen, maar een innig voelingnemen met mekaar, na het aanleeren van een uiterst gemakkelijke hulptaal alleen, kan werkelijk verzoenend werken...

Nu Amerika ontdekt is hoeven wij geen nieuwe zoogezegde ontdekkers.

Het Ei van Columbus is een geschiedenis, die iedereen doorziet, en waaraan zich geen verstandig mensch nog zal laten beetnemen.

De internationale taal is er : ESPERANTO.

Het menschdom behoeft er geen nieuwe, geen andere...

Pol VAN DER POEL.

## Intervjuo kun Jolan Földes

Antaŭ kelkaj monatoj hungara verkistino, Jolan Földes, gajnis la grandan premion en la romankonkurso, aranĝita de la agentejo Pinker en Londono. Partoprenis 14 grandaj libroeldonejoj en same tiom da ŝtatoj. « Literatura Mondo » kaptis tiun okazon por intervjui la gajnantino, verkistino de la « Strato de la Fiŝkaptanta Kato ». El tiu intervjuo ni citas tiujn vortojn, kiuj rilatas al Esperanto :

... Kion vi scias pri Esperanto ?

— Se diri la veron, mi preskaŭ estas Esperantisto — diras la verkistino. — Nome, kiam mi estis universitanino (mankas al mi nur doktoriĝo ne farita pro edziniĝo : mi studis filologion kaj hodiaŭ mi flue parolas preskaŭ dekon da lingvoj), mia samklasanino estis knabino nomata Balkányi, kiu estis fervorega esperantistino kaj instigis ankaŭ min al la lernado (jen do, mi pensis, tiu sorĉisto Balkányi eĉ ĉi tie antaŭis min !) kaj pro ŝia instigado mi fakte tralegis lernolibron de Esperanto antaŭ dek jaroj. De tiam mi kom-

prenas ĉiun Esperantan tekston. Foje Karinty donis al mi tradukitan novelon, dirante ke mi certe ne komprenos. Kaj pro veto mi tradukis sen vortaro al li la tutan novelon. Ankaŭ nun mi kuraĝus veti ke post diligenta studado de du semajnoj mi kapablus paroli tute flue kaj bone Esperanton.

(Nu, bone por mi — mi pensis. — Mia intenco de konverto trovis jam konvertitan animon. Ĉu veti aŭ ne veti? — tiel staras nun la demando. Sed mi vidas el ŝia certa memfido, ke en tia veto la perdinto estus nur mi. Prefere mi rezignas !)

— Ne, ne, — mi diras — prefere mi kredas vin. Ja ankaŭ Tolstoj diris proksimume la samon post studo dum du horoj. Sed kio estas via opinio pri Esperanto el filologia vidpunkto ?

— Al mi ne plaĉas nur tio, ke en Esperanto mankas la diversaj genroj kaj ke ĉiu substantivo finiĝas per -o, ĉiu abjektivo per -a. Sed cetere la konstruon de la lingvo mi opinias tre sprita.

— Sed ĉu vi scias, sinjorino, ke unu el la multaj celoj de nia lingvo estas : doni al la unulingvuloj proksimigantan helplingvon ?

— Jes, certe. En mia nun premiita romano la ĉefrolantoj ja estas tiaj « ekonomiaj emigrantoj », por kiuj Esperanto estis siatempe savo en Parizo. Tiuj homoj tre multe suferis en la fremda medio kaj nur tiuj kapablis iel enhejmiĝi tie, kiuj sciis Esperanton. Eble interesas vin, ke iam en Parizo mi farigis kelkajn vestaĵojn per hungara knabino perdinta unu kruron. En ŝia kripleco, la sola konsolo estis la societo de esperantistoj. Ŝi donacis al tiu societo sian superfluan energion, ĉiun eblan monŝparon, de ĝi ŝi ricevis la minimume necesan vivĝojon, tiujn plezurojn, kiujn aliaj belaj kaj sanaj knabinoj ricevis de siaj amatoj. Sen tio eble eĉ vivi ŝi ne estus povinta en la fremda medio. Cetere mi ne scias multe pri Esperanto, mi ne interesiĝis tre funde pri la movado, kvankam kiel verkisto mi ofte aŭdis pri ĝi.

Vere konsternaj estis por mi ĉi tiuj vortoj. Mi memoris pri la nova originala romano de Emba, en kiu la ĉefrolon havas ĝuste knabino de la supra tipo. Tiu ĉi virino ekvidas per unu ekrigardo, kion ofte ankaŭ ni, movadanoj, ne vidas tiom klare. Kaj nun mi jam estis absolute certa pri tio, ke la grandan premion ricevis verko ne senmerita.

— Kaj kion vi scias pri nia literaturo ? Ĉu vi opinias ĝin vivkapabla ?

— Se mi konas ion el la lingvo, tio estas ĝuste ĝia literaturo, fragmentoj el ĝi. Krom la fratino de Balkányi estis ĝuste verkistoj, kiuj parolis al mi pri Esperanto. Mi pensas, pli multe mi ne devas diri al vi.

— Kion vi dirus pri la Esperanta eldono de via romano

— Mi tre ĝojus pri ĝi, ĉar ja per Esperanto miaj vortoj venus ankaŭ en lokojn, kien per aliaj lingvoj ili ne povus iri, aŭ almenaŭ tre malfacile. (\*)

V. BLEIER.

(\*) Sian, nun jam mondfaman romanon verŝajne eldonos L. M. samtempe kun la alilingvaj eldonoj, en 1937.

## Bibliografio

LA VERBO EN ESPERANTO. Teorio kaj praktika uzado. Verkis Julius Glück kaj J. H. J. Willems. Eldonejo W. J. Thieme & Cie, Zutphen. Prezo 0,65 Gld. (10,50 fr.).

En la antaŭparolo la verkintoj diras ke ili skribis por ĉiu Esperantisto kaj tial forlasis ĉion nenecesan. Ili plene sukcesis en ilia laboro kaj prezentas bonegan studon de la verbo sub ĉiuj siaj formoj.

Estis tempo ke eliru simpla, fidinda libro, kiu estu verba biblio por la multaj Esperantistoj kiuj ne plu povas sin retrovi en la labirinto de « sciencaj » klarigoj de la « plenaj » gramatikoj kiuj vidis la lumon en la lastaj jaroj.

La verko, destinita al internacia publiko, estas tute en Esperanto kaj tiel utile influos por konservi la unuecon de la lingvo.

Bonegaj ekzemploj kaj klara lingvo farigas la libron valora studmaterialo. Per ĝi la eldonejo Thieme plifortigas la bonan reputacion kiun ĝi jam akiris per la modele prezentitaj literaturaj verkoj.

## Diversaĵoj

9-a NEDERLANDA - ESPERANTA - KONGRESO.

Dum Pasko okazos la kongreso de la Nederlandaj Esperantistoj en den Helder .

Tiuj, kiuj ĉeestis la 8-an en Leeuwarden povas kompreni, kia fariĝos la 9-a kiam ni promesas ke ĝi estos ankoraŭ pli brila kaj pli grandioza.

El la agendo ni povas mencli du festvesperojn kun amuzaj kaj Zamenhofsferplenaj programoj.

Krom tio la boatekskurso sur la vasta Holanda maro kaj al la birdinsulo « Texel ».

Por eksterlandanoj ni havas apartajn kondiĉojn.

Petu informojn je la sekretario de la Loka Kongresa Komitato :

S-ro P. DE JONG,  
Beukenkampstraat, 4,  
Den Helder. Holando.

## Sciigo

Post interkonsento kun la administracio de la tagjurnalo « De Dag », la rubriko pri ESPERANTO de nun regule aperos en la Dimanĉa numero.

---

**VARBU GAJNANTE !!**  
**GAJNU VARBANTE !!**

## Gratuloj

Al nia estimata Liga Prezidanto kaj al Sinjorino RAINSON, ni prezentas niajn plej sincerajn gratulojn, okaze de la naskiĝo de filineto LEA.

## Nekrologo

Mortis la patrino de nia agema membrino, Fino. de Graeve, sekretariino de sekcio Oostendè. Al la funebranta familio, Flandra Ligo Esperantista prezentas siajn plej sincerajn kondolencojn.

## Por Nia revuo

Novjardonaco de Sekcio ANTWERPEN (Flandrema Grupo Esperantista) frs. 100.—

## Grupa Vivo

ANTVERPENO. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA

La du gravaj okazintaĵoj dum la lastaj semajnoj, vere estis unue la reelektado de parto de la estraro. Nome : la prezidanto, la dua sekretariino, la festdirektoro kaj unu konsilanto. Escepte la konsilanto, kiu ne plu akceptis, ĉiuj aliaj estraranoj estis reelektitaj. Tio klare montras ke la membroj ne nur multe ŝatas la nunajn gvidantojn, sed ankaŭ plene aprobas iliajn agojn por la prosperiĝo de la grupo. Ke ili ankoraŭ longtempe povus gvidi nian grupon estas ĉies deziro.

La dua grava okazintaĵo estis la jarkunveno. Ĉeestis dudeko da gemembroj. La legado de la jarraporto rememorigis al ni la plej gravajn kaj ankaŭ la plej agrablajn vesperojn de la pasinta jaro. Sen multaj rimarkoj la raporto estis aprobita.

Poste la kasisto kondukis nin en la regno de ciferoj. La fakto ke ankaŭ ĉi-tie ni prosperas, tre kuraĝigis la membrojn. Fine, rilate la transiokiĝo de nia grupo, proponita antaŭ Novjaro, ni decidis, provizore resti en « Nieuwe Carnot ».

La 24-an de Aprilo 1937, nia grupo aranĝos « Kabared-Vespero » en la salono « De Ton », Pelikaanstraat, 22, Antverpeno. Ĉiuj geesperantistoj kaj geamikoj estas kore invitataj.

BRUSSEL — N. E. L. E.

La 18-an de Februaro la anoj de nia sekcio ĉeestis kursfinan feston en Vilvoorde, kie ili ankaŭ renkontis anojn de sekcio Zaventem. Agrabla kaj fruktodona vespero, kies rezulto estis : nova sekcio !

KORTRIJK

La 10-an de Februaro okazis ĝenerala kunveno, al kiu ĉeestis 34 gemembroj. Kiel estraranoj por 1937 estis elektataj : G. Debrouwere, prezidanto ; A. Cognie, sekretario-kasisto ; F.ino Germaine Deca-

luwe, bibliotekistino ; F-ino N. Lecossois, F-ino G. Bibaer, Jozef Theys, komitatatoj ; Mullie Victor, gvidanto de la kantista rondo ; Dewitte Germain, gvidanto de la bicikla sekcio. Pri la festkomitato sin okupo F-ino Siĉ kaj Maelfait Maurits.

La grupo nun nombras 45 anojn, kiuj ĉiuj estas membroj de Flandra Ligo. Ni insistas por ke ĉiuj ankaŭ abonu al Flandra Esperantisto ; nur familianoj loĝantaj en sama domo, povas sin kontentigi kun 1 abono.

Ni antaŭvidas ke minimume la duono de la grupo partoprenos al la kongreso de Leuven.

La venonta monata kunveno okazos merkrede, 3-an de marto.

#### LEUVEN. — «NOVA TAGIGO »

La 5-an de Januaro okazis en la « Flandra Domo » la lasta leciono de la Ceh-kurso gvidata de S-ro Sole. Ĉiuj lernantoj ĉeestis kaj ankaŭ promesis regule veni al la kunvenoj de la Grupo. En la nomo de ĉiuj lernantoj kaj anoj de « Nova Tagigo », estis prezentita al la instruisto du el la plej konataj majstro-verkoj de nia flandra literaturo : « La Leono de Flandrujo » kaj « Pallieter ». S-ro Sole promesis certe reveni al Loveno por partopreni al nia Kongreso kaj tiam revidi ĉiujn amikojn. Kiel ordinare sekvis amuza parto kun kantado, muziko, eĉ dancado.

La 12-an okazis la unua regula kunveno post la kurso. Bedaŭrinde la alveno estis neĝoja : nur 13 ĉeestantoj. S-ro Frantzen donis la unuan lecionon de la kurso por progresantoj, kiuj ĉiam sekvas kurson.

La 19-an la ĉeesio estis bona : pli ol dudek geanoj kaj gekursanoj ĉeestis. Car ni estis elpelitaj de nia ordinara ejo kie estas la piano, la kunveno kunportis nur seriozan parton : Sekvo de la kurso por progresantoj gvidita de S-ro Cnops.

La du unuaj kunvenoj post la kurso estis do sufiĉe lertaj kaj ni povas esperi ke la situacio de la Lovena grupo iom post iom pliboniĝos dum la venonta jaro.

#### MECHELEN. — LA ESTONTO.

Dum tiu vintra periodo ni speciale mencias la Scherer-paroladon kun lumbildoj, pri la miriga insulo Bali. Estis tre interesa kaj eĉ tre agrabla vespero, tamen ne sufiĉe ĉeestata laŭ la graveco. Ne ĉiun semajnon nin vizitas viro, kiu vidis la tutan mondon.

Ek de Februaro la semajnaj kunvenoj denove okazas ĉe la prezidanto, Hombeeksche steenweg, 54. Do, ĉiun Vendredon vespere je la oka. Sed akurate, ni petas. For la Mehlena horo ! Nia grupo nun ekzistas jam pli ol kvin jaroj. Nepre necesas ke ni serioze pripensas pli grandskalan laboron. Ĉiu membro kunlaboru kaj konatigu eblajn iniciatojn.

Ni ankaŭ jam atentigis la membrojn pri la Kongreso en Leuven. Jam nun nepre enskribu.

#### OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

Kiel ni prave atendis, la Csehkursoj bone sukcesas en Ostendo kaj ĉirkaŭaj urboj.

Jen pri niaj agadoj. En diversaj urbaj gazetoj aperis artikoloj pri Esperanto kaj Ĉseh-metodo. Kvar kinejoj aperigis reklamilojn sur la ekrano. Reklamo estas farita en Blankenberge. Esperantista forto okazis la postan sabaton. La plej grandan efikon faris vere la reklamiloj en la kinejoj, ĉar montritaj dum kvin tagoj, ili certe atingis dekmilojn da personoj.

Dum la provleciono ĉeestis 65 personoj. Malgranda parolado farita de nia prezidanto, klarigis al la ĉeestantoj la historion de la lingvo. Samtempe helpis la montrado de esperantaj libroj kaj paperaĵoj, al la enkonduko de la novuloj en la esperanta literaturo. Poste nia simpatia Ĉseh-instruisto, Karlo Solc, komencis la provlecionon. Malgraŭ ke post la provleciono nur enskribigis sin 4 personoj, la nombro de la enskribitoj tamen atingis 16 post la unua leciono, kaj 31 post la dua.

Blankenberge kaj Bruĝo kalkulas 32 kaj 20 lernantojn.

La 23-an de Januaro do okazis nia festo en la salonego « Bierhof ». La programo, bone prizorgita, havis la plej grandan aprobon. Ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj inter kiuj 12 el Nieuwpoort, kelkaj izoluloj el ĉirkaŭaj urbetoj kaj granda parto de la novaj Ĉseh-lernantoj.

La unua festparto komencita per la « Espero » sekvita de muzikadoj, kantoj, teatraĵeto, finiĝis per muzika skizo, la ĉefplado de la programo, kiu akiris fortan aplaŭdon.

Poste okazis la loterio kaj balo, kiu daŭris ĝis la 2-a matene.

Tiu festvespero estis la unua, kiun ni aranĝis tiusence kaj dankon ni ege ŝuldas al geamikoj R. Cabooter, Gve. Decler kaj Daems, kiuj tiel bone amuzigis la ĉeestantojn.

#### ROESELARE. — RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO (R.E.G.).

Jen, ni estas post longtempa silentado !

Nia vintra dormado estas for, dum kiu ni amasigis egan forton kaj kuragon por la nova jaro.

La 5-an de Februaro kunvenis nia grupestraro. Interkonsente ni decidis meti pli viglan vivon en nia grupo.

Estas elektitaj : kasinonon F-ino Alice Vansteenkiste kaj sekretario S-ro Marcel Termote.

S-ro H. Braekevelt, kiu ĝis nun ĉiam zorge plenumis la taskon kiel gvidanto de nia grupo petis anstataŭanton, estante tro multflankokupata kaj ne plu disponante je sufiĉe da tempo por zorge gvidi la grupon. Ni ĉiuj komprenis lian situacion kaj S-ro Marcel Termote transprenis la tutan laboron.

Ci-tie ni volas esprimi nian dankon al S-ro H. Braekevelt pro ĉio, kion li faris ĝis nun por nia Esperanta grupo, kaj por lia zorga kaj senlaca laboro !

La Esperanta kurso en nia urbo bone funkcias. Baldaŭ multaj novaj membroj pliriĉigas nian grupon. Ni jam priparolis la estontan Flandran Kongreson, kaj sendube ni ĉestos ĝin multnombro.

#### RONSE. — LA PACA STELO.

Niaj kunvenoj regule funkcias, kvankam pli multaj samideanoj povus ĉeesti niajn ĉiusemajnajn instruvesperojn.



Nia estraro nun kunvenis por ekorganizi Ĉseh-metodan kurson donota de eksterlanda Esperantisto, kaj jam de nun ni povas konfirmi ke ni ĉiuj faros nian eblon por ebligi sukceson. En principo oni pravas, entrepreni tian malfacilan taskon antaŭ la somerperiodo. En la sekvonta numero niaj gesamideanoj trovos pli detalajn klarigojn.

Rilate la nacia kongreso, ni ĝoje povas aserti, ke nia gruparone estos la lasta en la partopreno de tiu jara rendevuo ; jam de nun 12 enskribigis sin. Ankoraŭ kelkaj bonvolemluloj kaj ni atingos la plej belan ciferon kiun nia grupo iam atingis.

La sparkaso regule funkcias. La regula aperado de la « Grupa Vivo » en nia mezo pli kaj pli perfektigas, pro kio ni speciale dankas nian samideanon S-ro Geener Marius. Ni ankaŭ ne forgesis la alaĉeton de libroj, dum la literatura aŭ librotago, kaj ni atingis la plej altan sumon en la nuna jaro. Dum la kantvesperoj, ni havas S-ro Van Durme kiu pianludas kaj S-ro Van Coppenolle Jean kiu gvidas la diversajn kantojn.

#### TIENEN. — « ZAMENHOFA STANDARDO »

La lasta leciono de la Ĉseh-kurso en Tienen okazis la 10-an de Januaro je la tria. Ĉeestis la instruisto Karlo Solc, S-ro Cnops kaj S-ino De Kesel el Loveno, kaj 21 kursanoj. Je la 5-a fondiĝis nia Esperanto Grupo sub la nomo de « Zamenhofa Standardo ». F-ino M. Carlens fariĝis prezidantino, F-ino Valentine Jochmans kasistino kaj S-ro Modeste Truyens sekretario. Je la nomo de la klubo, la prezidantino dankis S-ron Solc pro liaj tre interesaj konversacioj kaj prezentis al li memorigaĵon. Li ankaŭ dankis nin kaj diris ke kun bedaŭro li devis forlasi Tienen kaj promesis redivi nin dum la Kongreso en Leuven. Poste venis la amuza parto de la kunveno : oni kantis, oni rakontis, oni ridis, oni trinkis kaj oni dancis. Ni kondukis S-rojn Solc kaj Cnops ĝis en la stacidomo.

La unua kunveno de la nova grupo okazis Dimanĉe la 17-an de la 15-a ĝis la 19-a kaj duono. Ĉeestis krom la estraro, naŭ aliaj esperantistoj. Ĉiuj pagis la ligkotizon. Oni laboris vigle, serĉis novajn vortojn kun sufiksoj. Antaŭe oni kantis la kantojn kiujn oni lernis la antaŭan dimanĉon. La tempo rapidege pasis kaj ĉiu iris hejmen, kunportante gajan memoron pri tiu kunveno. Kelkaj anoj havis malhelpon veni sed ili promesis nepre veni la sekvontajn kunvenojn.

## Angulo de la Serĉemuloj

Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5-a de Aprilo 1937, rekte al S-ro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen. La difinoj kun (R) estas radikvortoj.

*Premioj.* Por la problemoj 16 kaj 17 gajnis Fraŭlino Van der Mast. Ni ricevis premiojn de Fraŭlino Van der Mast. Koran dankon !

*Solvo de Problemo 16.* Haringo, hamakon, importi, orkideo, absorbi, oksigeno, heroldo kaj ortolano.

*Solvo de Problemo 17.* Mi pli ŝatus ke *mi* havus ĉion, anstataŭ vi !!! Preskaŭ ĉiuj malsukcesis kaj ne vidis la simplan vortludadon.

Problemo 20 (44 poentoj)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	
1												Hor. 1) Koleretigi (R) — altranga persono (R)
2		■									■	2) altranga fremdlanda persono (R)
3				■				■				3) fremdlanda monero — kolekto — simila — egala (R)
4					■		■					4) anagramo de hel — pa- trino (mallongigo)
5						■						5) kamplito (R) — ligna domo (R)
6						■						6) Greka urbo — frukto
7					■		■					7) sufikso — montra ad- jektivo
8				■				■				8) kontraŭo de ado — pa- roli (R) — anagramo de ses
9		■									■	
10												

- 9) altvalora ŝtono (R)  
 10) sana agado (R) — parto  
 Vert. 1) objekto — elkrio — prefikso (demisii)  
 2) rekomenci batalon kontraŭ malamiko (R)  
 3) lernosistemo  
 4) pronomo pers. — ŝafharo — marŝi (R)  
 5) anagramo de vat — korta birdo sen vosto (R) — preciza tempo  
 de iu okazaĵo (R)  
 6) peceto — loko kie finiĝas iu definitiva spaco (R)  
 7) prepozicio — bopatro (mallongigo) — veturilparto (R)  
 8) denove — peco (R) — interjekcio  
 9) lerniganto  
 10) fremda frukto (R)  
 11) insekto (R) — cifero (turnigita) — reson.

— Problemo 21 (3 poentoj)

Maljuna Mahometano mortis. En sia testamento li menciis ke liaj du filoj (la heredantoj) devis pelgrimi, ĉiu sur kamelo, al Meka, la sankta urbo. La posedanto de tiu kamelo kiu la lasta enrajdas la sanktan urbon trans la pordego estos la nura heredanto. Ili du ope rajdis al Meka kaj haltis proksimume je 500 metroj de la pordego, kaj tie atendis la unu post la alia, ĉar kompreneble nek la unu nek la alia volus perdi la heredaĵon. Ili jam bivakis dum tri tagoj kiam preterpasanta Derviŝo pro kuriozeco, ĉar oni tie bivakis, alparolis ilin, kaj demandis kial ili restis tie. La du fratoj rakontis al li la strangan testamentan decidon. Post mallonga pripensado la Derviŝo flustris ion en la oreloj de la du fratoj, kaj subite ili forkuris al la kameloj, sursaltis ilin kaj galope rajdis por transpasi kiel unua la urbpordegon. Kion flustris la Derviŝo en la oreloj de la du fratoj

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.  
**Postчек:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

### **AFDEELINGEN:**

**Aalst:** « Pioniro ». Sekretariaat: Denderstr., 20.  
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.  
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.  
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 11.  
**Leuven:** « La Nova Tagiĝo ». Sekr.: Tienschestraat, 106.  
**Lichtervelde:** « La Tagiĝo ». Sekr.: Wetstr., 44.  
**Mechelen:** « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.  
**Oostende:** « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Peter Benoitstr., 27.  
**Roeselare:** « Ruselara Esperantista Grupo ». Hoogledesteenweg, 163-165  
**Tienen:** « Zamenhofa Standardo ». Sekr. Bruulstraat, Kumplich  
**Zaventem:** « Verda Standardo ». Sekr.: Heldenplaats, 115.

### **VERTEGENWOORDIGERS:**

**Aarschot:** Van Winckel J., Fabriekstraat, 28.  
**Arendonk:** De Troeyer A., Gasthuisstraat, 98.  
**Assche (Brab.):** L. De Rop, Tenberg, 24.  
**Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.  
**Diksmuide:** Mackelberg, IJzerlaan.  
**Gent:** F-ino J. Terryn, Raapstraat, 82.  
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.  
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.  
**Ronse:** G. De Boes, Wijnstraat, 81.  
**Tielt:** R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.  
**Vichte:** G. Faveere, Statiestraat, 21.  
**Wilrijk:** D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.  
**Woumen (W. Vl.):** H. Verfaillie, Schrevelstraat

## **PARTOPRENU LA VARBKONKURSON DE** **FLANDRA ESPERANTISTO**

Valorajn libro-premiojn al varbantoj de abonantoj.  
Vidu la konkursan regularon en la n<sup>o</sup> 7 de F. E.  
Ensendojn ni akceptas ĝis la 14-a de Marto  
Nepre petu viajn premiojn antaŭ la 31-a de Marto

OSTENDO

---

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

---

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

---

### DRUKKERIJ

★

Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.

## “BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brusel

Lekkere Drinken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



## Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo

---

### LUOTA

1/4 pago: 75 fr. por 12 monatoj;  
50 fr. por 6 monatoj.

1/8 pago: 50 fr. por 12 monatoj;  
30 fr. por 6 monatoj.

---

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.